

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de Esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando.—Redakcio: Glorieta de Bilbao, 5.
———— Julio Mangada Rosenörn.—MADRID ————

II^a
JARO

NUM. III.^a.—MARTO 1929

II^a
JARO



Tipa Kampodomo.—Asturias

PRI LA VIII^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
EN
OVIEDO

La LKK por nia nacia Esp-Kongreso nelacigeble laboras kaj provizore diras:

Ni havis grandan sukceson pro interrilatigo de la Grupo «Oviedo» kun la Oficejo pri Turismo ĉar la prezidanto de la Grupo, S-ro Antonio Jiménez Mora, ĉeestis kunvenon de la komitato por Turismo, sub prezido de la Provincestra Moŝto, por sin proponi (je la nomo de la Grupo) sindoneme, absolute, al helpo esperanta en turisma kunlaborado, vidigante per gvidlibroj, anoncoj, k. t. p., la gravecon de Esperanto koncerne la propagandon pri Turismo. La kunveno estis forte impresata de la parolo kaj pruviĵoj de S-ro Jiménez Mora, kaj tial, laŭ propono de la Provincestra Moŝto, unuanime voĉdonis nian samideanon Voĉdonanto de la Komitato por Turismo de Asturias.

Lia Provincestra Moŝto, Lia Generala Militprovincestra Moŝto, Lia Provinca Deputatestra Moŝto, kaj Lia Episkopa Moŝto, akceptis Honorajn Vicprezidentecojn de la Kongreso. La unua petis propagandajn glumarkojn de la Kongreso kaj ordonis al sia privata sekretario uzi ilin sur sia tuta korespondaro; la lasta bedaŭris ne esti lerninta Esperanton pro peza laboro, kiam S-ro Ricardo Codorniu, lia granda amiko, proponis al li la lernadon; la Episkopa Moŝto esprimis laŭdojn varmajn al nia mortinta samideano Codorniu, unua hispana esperantisto kaj tutmond fama arbora inĝeniero.

La Kongreso preskaŭ certe venigos nian karegan prezidanton de la Akademio, S-ron Theophile Cart, kiu estas honora membro de Hispana Esp-Asocio, por ke li denove kŝhotigu kaj kuragigu per sia respektinta parolo hispanan samideanaron.

Estos solenega meso kantata de bonaj horoj, kun prediko en Esperanto, tute certe nia samideano de Gijon, pastro Fournier faros la predikon.

Estos rimarkinda ekskurso de la tuta Kongresanaro al *Noreña*, okaze de unu el plej gravaj kaj rimarkindaj pilgrimekskursoj de *Asturias*. La Urbeŝtraro kun muzikistaroj kaj la vilaĝfraŭlinaro tipe vestita akceptos la Kongresanaron.

Ĵus ĉi tie oni malfermis kurson, kiun partoprenas entuziasmege deksep viroj kaj dudekok belegaj junulinoj. La LKK celas ke ĉi tiu pilgrimekskurso estu tute senpaga por la kongresanoj, kaj ĉio esperigas tiel okazu. La Urbeŝtraro akceptos la kongresanaron oficiale.

Miriganta ekskurso tra Asturias por ĝui la belajn pejzaĝojn kaj artoplenajn monumentojn (*Villaviciosa, Mirador de Fito* — Rigardejo de Fito —, *Cangas de Onís, Covadonga*, k. t. p.) En *Villaviciosa* oni montros al la Kongresanaro la fabrikon de pomvino (*sidra*) «*El Gaitero*» (La Flutisto) kaj regalos la ekskursantojn per la bongustega *sidro*, kaj donacos al ili belajn propagandilojn de la pomvino.

La malfermo de la Kongreso, kun ĉeesto de ĉiuj Aŭtoritatoj, okazos en ĉefa teatro, kaj la fermo okazos en la proksima kaj gravega urbo *Gijón* (Hihon). La Deputataro kaj ankaŭ la Urbeŝtraro de Oviedo solene akceptos la Kongresanojn; same faros la Urbeŝtraro de Gijón.

Estos grandioza muzikfesto organizata de la fama kaj meritplena *Orfeon Ovetense* (Ovieda Ĥoraro), en teatro; ĝi aŭdigos regionajn popolkantojn laŭ centvoĉa ĥoro, kun soloj ankaŭ. Estos kantataj La Espero'n kaj la Esperanto-Himno de Asturias, certe ankaŭ «*Preĝo'n Sub la Verda Standardo*», himno de Hisp.-Esp.-Asocio. Multenombra orkestro akompanos la Ĥoraron.

Estos internacia Konkurso de pupoj vestataj tipe regione, nacie, kaj oni difinos gravajn monpremiojn.

Oni disdonos belajn bantojn riĉajn al la esperantaj flagoj ĉeestantaj la Kongreson; oni faros filmon de la Kongreso (por la tuta disvolvigado) kaj okazos prelegoj pri juraj, folkloraj, k. t. p., temoj.

Certe oni atingos fervojrabaton same, kiel por la antaŭaj Kongresoj, kaj favorajn loĝprezojn.

Oni laboras varme por organizi specialan rimarkinde altvaloran internacian konkurson, kiu estus nova en la tuta mondo kaj efikege helpus la esperanto-movadon.

La Komerca Ĉambro de Oviedo donacis al la LKK 250 pesetojn.

Kuraĝiĝu, do, karaj gesamideanoj; aliĝu tuj al nia VIII^a, por ĝui tiom da belaj pejzaĝoj, da mirindaj malnovaj monu-

mentoj; tiom da ĉarmo de la idinoj de Asturias, tiom da gastameco de la simpatiaj kaj noblaj asturoj, tiom da bongusta kaj trinktiranta *sidro*, tiom da plezuro de nia kunestado en Oviedo sub la helpo kaj protekto de la Aŭtoritatuloj kaj gravaj Institutoj, kiuj tute bone konsciis gravecon kaj utilecon de Esperanto. Aliĝu, aliĝu amase, kaj vi ebriiĝos dum la tuta restado se ne pro la bongustega *sidro*, jes, certe, pro tiom da kontento, kaj certe vi konservos dum tuta vivo profunde ŝatatan rememoron de nia VIII^a. Fremduloj venu al ni, venu fali en la fratajn brakojn de la Hispanoj, kiuj tutkore plezurigos vian restadon en la belega pentrinda, tradicia, nobla hispana regiono Asturias!

Ĉiuj, kiuj deziras koni la mirindan asturan regionon, ĉu esperantistoj, ĉu ne, profitu ĉi tiun okazon, por trafi la plenumadon de la deziro laŭ eksterordinaraj cirkonstancoj de ĉiuj vidpunktoj pro kompleteco, ekonomio, festoj, k. t. p.

Bonvolu traduki hispane ĉi tekston kaj ĝin aperigi sur la gazetaro por disvastigi la favorajn kondiĉojn por la Kongreso, de la 14^a ĝis la 18^a de septembro de ĉi tiu jaro. Fremdaj gazetoj bonvolu represi laŭ eblo. KOTIZO: KVIN pesetoj. ADRESO: Al Komitato por la VIII^a Hispana Esperanto-Kongreso. Ateneo Popular. OVIEDO (Asturias).

PROJEKTO

pri kiel eble plej simpla organizado de la Tutmonda Esperantistaro.

(Daŭrigo)

III

Lokaj T. E. O.-societoj

Devizo: Unu horon en semajno por Esperanto!

Tipo A.

- 1) Celoj notitaj per punkto 1-a (II ĉapitro).
- 2) Efektivigo de la celoj.
 - a) La membraro estas diversa (je socia klaso, je klera stato, je ofico ktp). *Atingado de ia celoj*: la sola aranĝanto de la interna vivo estas estraro. Por bone informi pri sia agado la anaron,

la societo havas nuran gazeton (informilon). Ĝi povas uzi kune kun aliaj societoj (eble en la tuta ŝtato) komunan presitan ĉiusemajnan informilon, per kiu ĝi sciigas ĉiujn siajn aranĝojn por ekz. du semajnoj. La societejo estas unufoje ĉiusemajne dum du horoj malfermata por kunvenoj. se la societo havas ĝis 50 anojn, oni konas preskaŭ ĉiujn, sed tamen hejmeco ĝenerala (almenaŭ en oficialaj okazaĵoj) ne estas dezirinda (se ia rondo aŭ grupo estas «inter si» tiam ĝin oni ne povas malpermesi). Dum kunvenoj: oni (inter) parolas Esperante: la societo abonas laŭeble multajn gazetojn, havas alsenditajn ĉiaspecajn katalogojn, adresarojn, reklamojn, ili estas riceveblaj por legado en la societejo; malgranda biblioteko, uzado de komuna rondvojaĝanta biblioteko de T. E. O.; (granda parto de personoj ne ŝatas lerni lingvon se ili ĝin urĝe ne bezonas, pro tio okazas, ke esperantan kurson partoprenis 15-20 personoj, sed esperantistiĝis nur 2-3 pers.) studrondo, kie oni ellernas dum unu jaro la lingvon komune gaje tempon pasigante per babilado, ludoj ktp. (ĉiaspecajn tipojn de studrondoj oni povas priskribi en intersocieta komuna aŭ en T.E.O. oficiala gazeto): 5-8 diversaj paroladoj dum jaro (nepro kleriga celo, sed pro lingvopraktika: aŭskultanto aŭdu Esperanton diverssteme, la oratoro kutimu paroladi Esperante); viva gazeto (specimeno en tipo B) laŭbezone, 4-8 literaturaj horoj aŭ vesperoj en la jaro (de deklam-kaj de voĉlegamantoj amatoroj) por konatigi tutmondan aŭ fremdnacian literaturon (per Esperanto-tio estas ankaŭ propagando por nia lingvo!); 3-6 foje en la jaro estas antaŭviditaj hejmaj festoj kun programo (ke oni aŭdu Esp. diversflanke, diverssteme), inter tiuj dezirinda 1 tradicia tevespero. Somere komunaj promenoj al ĉirkaŭaĵo, boatveturoj ktp.-jen kiel oni ligus homojn somere! Tio estas natura vojo por ellerni kaj konservi fremdan lingvon anstataŭ sola alia ilo: sidi kaj studi fin-fine tedajn librojn!

b) Badaŭrinde, personoj nespertaj kaj needukitaj rilate societan gvidadon opinias, ke nur tio estas propagando, se oni disdonas presitajn propagandfoliojn kaj aranĝas publikajn paroladojn (aŭ almenaŭ ion similan grandiozan, kiu multe da mono bezonas). Sed ekzistas multaj pli komplikaj kaj efikaj propagandiloj, kiujn rekomendus specialistoj de T. E. O.-centro. Krome loka societo efektivigus *komunan propagandon iniciatitan de T. E. O.-centro*. (ekz. tutmonda tago de propagando

por Esp. tutmonda proponoj al komercistoj, al radiostacioj ktp., ekuzi Esperanton (dum tempe), se ia granda nombro da personoj donis la saman promeson).

c) Rilate lingvajn aferojn rajtas ĉiu T. E. O.-societano turni sin skribe al lingva oficejo kaj esprimi siajn opiniojn kaj proponojn en ĝia parto de gazeto.

3) *Membreco*. Kotizon difinas loka societo ĉiujare. Membrokartoj havas du numerojn (de loka societo kaj de universala aŭ centra). Oni akceptas la anon nur tiam, se la kandidato konas la statuton, hejmordon kaj pliajn regulojn (la sencon, karakteron kaj bezonon de T. E. O.). Aliĝante kandidatoj plenigas aliĝilon, kie estas demandoj pri kono de lingvoj, pri ofico, socia stato, pri spiritalaj inklinoj (religio, ŝatas literaturon; aŭskultas radion (havas potencon aparaton; ŝatas filozofion; sportema; sciencamanto, ktp.) ktp. Al centrejo oni sendas nur nomaron de anoj kaj kun ĝi la statistikan liston (laŭ aliĝiloj) kun ĝi por ke oni vidu statistike, ĉu la nombro de esp-istoj estas sufiĉe granda por eldoni «Radio-Revuo», «Sportan Heroldon», provizi filmojn per Esperantaj skriboj, fondi ian profesion ligan ktp.

Se la *ano bezonas servon* ekster sia societo kaj sia lando li aliĝas krome al U. E. A. ĉar la estrar (an) ojn kaj aliajn organojn de T. E. O. ne estas devigitaj plenumi servojn ne rilatajn T. E. O. kaj ĝian societan vivon.

4) *Ĝenerala kunveno* konfirmas protokolon de la lasta kunveno, akceptas: raportojn pri lastjara agado, pri laboro de revizia komisiono, pri kaso, budĝeton por sekvonta jaro. Elektas estraron, revizian komisionon, urĝe bezonajn komisionojn, dum tri jaroj unu foje komitaton de T. E. O., diskutas pri diversaj demandoj. Ĝen. kunv. de lokaj societoj tutmonde estu laŭeble dum la sama monato. Por kunveno (precipe ĝia ordo) estas detala regularo-skribe verkita, formiganta tradiciaron.

La devo de T. E. O.-societo estas klarigi al la anoj la gravecon de bona T. E. O.-societa vivo kaj interesi ilin pri tio kaj parte eduki ilin por societa vivo. Tiurilate estas tasko klarigi, ke oni konsideru elektojn ktp. serioze, oni elektu al la oficojn personojn, kiuj estas interesitaj pri la afero mem (ne pri ĝia nomo) kaj pri kiuj oni scias, ke ili estas kapablaj plenumi taskojn fiditajn al ili.

5) *Estrar* estas 3 persona (prez sek. kas.) Estraro gvidas la internan vivon kaj prezentas societon ekstere.

6) *Revizia komisiono* estas 2 persona. Ĝia tasko reviziado de kaso, de okazintaj konfliktoj, observado, ke la organoj de la societo funkciu laŭ la statuto kaj reguloj, ke ĉiu plenumu al li fuditajn taskojn korekte; okaze de malordo, esploro (kritiko) de la afero kaj prezento al ĝenerala kunveno por decido.

(Daŭrigota)

NEKROLOGIO

Ĵus mortis en Cordoba nia malnova kaj fervora samideano, S-ro Pantaleon Marivela, kiu kune kun aliaj samideanoj de tiu urbo fondis la Kordoban Grupon en la jaro 1910. Li aktive propagandis nian sanktan aferon kaj instruis la lingvon al ŝia filo Ludoviko. Lia familio ricevu la sinceran kaj tutkoran kondolencon de la Hispana Esperantistaro.

ENLANDA KRONIKO

La MINISTERIO de PUBLIKA INSTRUADO, DIREKCIO de DUA kaj SUPERA INSTRUADO dekretis subvencion da 1.000 pesetoj al HISPANA ESPERANTO ASOCIO, je la 29.^a de la ĵus pasinta decembro. Iom post iom, la serioza agado de nia Asocio gajnas intereson kaj helpon, ĉar la Ministro, per la ĉiujara raporto pri nia agado, per la informo de la oficiala Inspektoro, per niaj kongresoj, konstatas ke nia movado meritas atenton kaj helpon. Ĉi tio kuraĝigu la samideanojn por pli vigle labori kaj varbadi novajn adeptojn al H. E. A., ĉar ju pli ĝi estu multenombra des pli meritos atenton kaj helpon.

Estas kontentige rimarki la viglan renaskiĝon de Esperanto en la tuta lando, ĉi tio okazas dank'al la laboro konstanta de Hispana Esperanto-Asocio, kiu pli kaj pli multenombriĝas kaj plenumas la celon de tutlanda Unuiĝo ĉe plej granda kunlaborado lasante al individuoj kaj organizaĵoj lokaj kaj regionaj kompletan liberecon.

La jaŭdon 17^{an} de la ĵus pasinta januaro, vespere, okazis en la Ateneo Gaditano (Cadiz) solenega malfermo de Esperanto-kurso, sub prezido de la Provincestro, kun ĉeesto de reprezen-

tantoj de la milithavenestro kaj provinca financestro, kaj de la tre klera, erudicia, kompetenta gramatikisto premiita de la Reĝa Hispana Lingvo-Akademio, profesoro pri Literaturo de la Instituto, S-ro Demetrio Nalda, kiun invitis la Provincestro kaj Komitato de la Esperanto-Societo por la malfermo, kaj ĉi tio estas grava, ĉar elpruvas, ke la aŭtoritatuloj pli kaj pli interesiĝas al nia afero.

La prezidanto de la Esperanto-Societo, S-ro. Francisco García Merchan salutis la aŭtoritatulojn kaj prezentis la oratorojn: S-ro, Johano García de la Vega dokumentite parolis pri historio de la lingvo Esperanto kaj pri profitdonaj servoj de la lingvo al tiuj kiuj ĝin uzas; S-ro. Rafaelo Ballester, humila sed sperta kaj klera laboristo prave parolis pri la lingvo, kiu estas ĉies kiu estas aparta ĉiropaĵo nenies, vera idealo, granda simplaĵo; pri la kvalitoj de Esperantisto: fido sen okulkovriloj, kaj sindonemo; pri la sola kondiĉo necesa por esti Esperantisto: volo, volo kaj volo. Fine parolis S-ro. Nadal, kiu elokventege laŭdis la sindonemon kaj celon de la Esperantistoj, kaj kondamnis tiujn, kiuj sisteme, sen bazo por kontraŭstaro, parolas malbone pri Esperanto, eĉ ĉi tiun ne konante, forgesante ke ĉe la mondo estas necesaj grandaj amo kaj idealismo; science sed kompreneble, de la vidpunktoj de sia premiita verko (Gramática Castellana), la erudicia profesoro mirinde pritraktis la lingvaĵon, kiu ju pli la homo progresis, des pli evoluigadis por fariĝi la pero al interrilatiĝado por plenumi la eternan Leĝon, kiun Dio starigis...; sed al sincera interrilatiĝado, ĉar hipokriteco estas kancero de la homaro: «paroli estas heroaĵo, estas kvazaŭ kono pri si mem, sopiro al memperfektiĝo, rezonado kaj racieco; plenumado de devoj kaj amo al similulo, Sankta Paŭlo diris, ke «la lango estas unu el la plej malgrandaj organoj de la korpo kaj tamen ĝi ekbruligas grandajn bruladojn», kaj plentereze daŭrigis pri la opinioj koncernantaj la devenon de la lingvoj, pri la nombro da lingvoj nuntempaj, pri la reveno al la unua Natura lingvostato laŭ filozofaj studoj modernaj, pri sciencaj medicinaj rilatoj kaj studoj al la lingvoj kaj prononcado, pri diverseco de lingvoj tute malsamaj parolataj de popoloj apartenantaj al sama familio; pri la celo al dua lingvo kaj manieroj ĝin atingi kaj pri ĉi tio li citis la jenajn hispanojn: Raimundo Lulio (XIII jarcento), kiu planis ĉian pensmaŝinon, kiun

imitis multaj fremduloj; Petron Sanchez Izquierdo, kiu verkis «Faro de la ciencia» (Lumturo de la Scienco); monaĥon P. Ma-trava, kiu verkis «Ginegrafia»; Sotos Ochando, aŭtoro de tre interesa projekto pri lingvo internacia; Vidal, kiu, je 1844, publikigis sian «Lengua Universal y analítica» (Universala kaj analiza lingvo); L. Selbor, je 1888, aŭtoro de «Estudio Filológico sobre la lengua universal» (Filologia studo pri universala lingvo), citante ankaŭ la «De Dayud», kiu aperis en Barcelona je la unuaj jaroj de ĉi tiu jarcento; ankaŭ li citis fremdajn projektojn, finante por kuraĝigi al alpreno de Esperanto, kiu estas la sukcesanta projekto solvanta la problemon.

Fine la provincestro legis telegramon de la Ministro de P. I.: «Tre dankema je via afabla invito por solenigi la mafermon de la kurso en la Ateneo la 17^an de la nuna monato, mi bedaŭras ne esti eble al mi ĉeesti, ĉar urĝaj aferoj solvotaj detenas min. Kore mi salutas ĉiujn».

Atentu bone, ke la malfermo de ĉi tiu kurso estas vere granda sukceso vidiganta nian antaŭeniron.

En Badajoz la kursoj disvolvigadas, kaj la ĵurnalaro ĉiusemajne aperigas novaĵojn pri Esperanto influante tiel la publikon, ĉar «El Correo Extremeño» kaj «La Libertad», k. c., informas detale sukcese.

En Barcelona oni daŭrigas la laboron al reorganizo de la regionaj Esperantistoj, kaj dume oni okazigas propagandajn festojn kaj klarigadas kursojn. La 22^an de la ĵus pasinta januaro La Akademio Enciklopedia Esperanto, en sia sidejo, Galileo, 40. Sans—laŭ tute alloga programo okazigis gravan feston en kiu literaturo, muziko kaj oratorarto plene sukcesis: la Kvinteto ODEON ludis bone el sia repertuaro; S-ro Anglada Prior dokumentite kaj trafe parolis pri «Graveco de Esperanto-Kongresoj, organizado, kaj aplikado de la lingvo al iuj aktivecoj de la moderna vivo»; S-roj Pedro Ardiaca kaj Orpi recitis versaĵojn, la lasta originalajn, kaj flne S-ro Campos parolis pri pedagogio. Ankaŭ teatramatora aktoraro de la Kooperativo «La Flor de Mayo» ludis la komedieton «Las Tres Alegrías» (La Tri ĝojoj) sub gvidado de S-ro R. Cama. La Akademio eldonis, por anonci las feston, tre interesan kvarpaĝan folion, sur kiu aperas la programo pri kursoj entreprenitaj de la Societo, gravaj novaĵoj pri Esperanto, kaj la programo por la

festo. Ĉi tiu serioza kaj alloga laboro multe helpas la disvastigon de nia idealo.

En Madrido vigle oni daŭrigas la aferon: S-roj Escartin kaj Barrios sukceplene varbadas fervojistojn al la tutlanda Ligo de Esp.-Fervojistoj; la 27^{an} de la ĵus pasinta januaro, la Grupo «Antaŭen, ĉe la ĉefsalono de «El Fomento de las Artes», okazigis propagandan feston. S-ro San Antonio (Carlos) elokven-tege parolis pri neceso de la helpa internacia lingvo Esperanto, kiu entenas idealon pri plej supera amo inter la homoj, certa bazo por tutmonda paco. Por vidigi la adapteblecon kaj utilon de Esperanto, la ĥoreto de la Grupo, kantis hispanajn kaj frem-dajn popolkantojn. Ĉi tiu Grupo eldonis bonegan kvarpaĝan propagando-folion pri Esperanto, kun gravaj opinioj de tut-mondfamuloj.

En Zaragoza la Grupo Frateco daŭrigas vigle sian laboron: ĵus oni voĉdonis novan komitaton, kies prezidanteco estis do-nata al nia malnova kaj entuziasma samideano S-ro Manuel Maynar. La ĝenerala kunsido de la Grupo vidigis la atingitan sukceson, ĉar la nombro da membroj triobligis dum la pasinta jaro, kaj la kaso transiris de defcito al kapitalo enkasigita kon-sistanta el 661,55 pesetoj kvankam la Grupo havigis al si li-brojn, meblojn kaj, inter aliaĵoj, belan riĉan silkoflagon. La la-boro per kursoj kaj ĉiel daŭradas kaj, por akurate informi la publikon, ĵus S-ro Maynar malfermis sur la ĵurnalo «La Voz de Aragon» esperantan kronikon. La kunsido voĉdonis dan-kesprimon al S-ro Jozefo Oros pro lia granda kaj fruktodona laboro dum la pasinta jaro.



Bela peizaço de Asturias

PRI INTERPUNKCIO POR LA SKRIBAĴOJ

(Daŭrigo)

PRI PROPOZICIARO

Propoziciaro estas aro el propozicioj interrilitigataj kaj formantaj kompletan sencon.

En la propoziciaro, propozicio povas esti *reganta* aŭ *ĉefa*, kaj *regata* aŭ *dependa*. Estas ĉefa ĝi kiam ne dependas de alia, kaj entenas, tial, la fundamentan penson de la propoziciaro. La regata, kontraŭe, ne havas senson sen la ĉefa, kaj ĝi estas ĉiam al la servo de tiu, ekzemple: *mi lernos Esperanton, tial ke ĝi estas facila kaj utila*. La unua propozicio estas la ĉefa, car la dua sen tiu diras nenion. Ĉi tiu propoziciaro estas *simpla*, ĉar ĝi havas solan ĉefan propozicion, se ĝi havus pli ol unu, oni nomus ĝin *kunmetita*; ekzemple: *la ĉevalo estas bela, kaj ĝiaj movoj estas rapidaj kaj graciaj, sed ĝi estas tre multekosta; la mulo estas malpli bela, malpli rapida, sed pli malmultekosta kaj rezistema; laste, la azeno estas pli malbela, ankoraŭ pli malrapida, sed multe pli malkara, kaj ĝi estas tre rezistema*.

Ĉiuj propozicioj, interrilitigataj de kondiĉaj, kaŭzaj, kontraŭaj, komparantaj kaj ligantaj konjunkcioj, estas *regataj*.

Membroj de la propoziciaro estas la ĉefaj propozicioj kun iliaj modifantaĵoj kaj komplementoj; *membrofrazetoj* estas la propozicioj regataj.

Inter la sinsekvaj partoj de propozicio ekzistas precizaj rilatoj same, kiel ankaŭ ekzistas inter la diversaj propozicioj, kiuj povas formi propoziciaron.

La rilato inter la sinsekvaj partoj de propoziciaro povas esti *apuda* kaj *malproksima*.

Estas apuda rilato: 1.^e, inter la membroj de propozicio; 2.^e, inter vorto ĉu membro aŭ parto de membro kaj la modifantilo determinanta ĝin.

Estas malproksima rilato: 1.^e, en tuta serio, ĉu el propozicioj (ĉefaj aŭ regataj), ĉu el membroj, ĉu el modifantiloj, inter la diversaj terminoj, el kiuj ĝi konsistas; 2.^e, inter la vorto reganta kaj ĝia klariganta modifantilo; 3.^e, inter la reganta propozicio kaj ĝia regata.

(Daŭrigota)

DE LA PUNTUACION DE LOS ESCRITOS

(Continuación)

DE LA CLÁUSULA

Cláusula es un conjunto de proposiciones relacionadas y formando sentido completo.

En la cláusula, una oración puede ser *regente* o *principal*, y *regida* o *subordinada*. Es principal cuando no depende de otra y encierra, por tanto, el pensamiento fundamental de la cláusula. La regida, por el contrario, carece de sentido sin la principal, estando siempre al servicio de ésta; por ejemplo: *yo aprenderé Esperanto, si tan fácil y útil es*. La primera oración es la principal, pues la segunda sin aquélla no dice nada. Esta cláusula es *simple*, por tener una sola oración principal, pues si tiene más de una, se llama *compuesta*; por ejemplo: *el caballo es bello, y sus movimientos son rápidos y graciosos, pero es muy caro; el mulo es menos bello, menos rápido, pero más económico y resistente; por último, el asno es más jeo, aún más tarde, pero mucho más económico, y es muy resistente*.

Todas las oraciones relacionadas con las conjunciones condicionales, causales, adversativas, comparativas e ilativas son subordinadas.

Miembros de la cláusula son las oraciones principales con todos sus modificativos y complementos; *incisos* son las oraciones subordinadas.

Entre las partes consecutivas de una oración existen ciertas relaciones, como también existen entre las varias proposiciones que pueden constituir una cláusula.

La relación entre las partes consecutivas de una cláusula puede ser *inmediata* y *remota*:

Hay relación inmediata: 1.º, entre los miembros de una oración; 2.º, entre una palabra siendo miembro o parte de miembro y el modificativo que la determina.

Hay relación remota: 1.º, en toda serie, ya esté constituida por oraciones (principales o subordinadas), ya por miembros, ya por modificativos, entre los diversos términos que la constituyen; 2.º, entre la palabra regente y su modificativo explicativo; 3.º, entre la oración regente y su regida.

(Continuará)

KIO ŜI AL MI?

I

Estas al mi ŝia belo,
celo;
amjesanta ŝia diro,
deziro;
ŝia flama la rigardo,
ardo.
Estas al mi la standardo
plej alloga kaj plej glora
ŝia la hararo ora,
pro la cel', dezir' kaj ardo.

II

Ŝia milda diresprimo,
rimo;
sur la lipoj, ŝia rido,
konfido;
en okuloj, ŝia larmo,
ĉarmo.
Tial amoplena varmo
en la mia koro ardas,
kiam mi ŝin ekrigardas,
pro la rim', konfid' kaj ĉarmo.

III

Al mi ŝia neestimo,
timo;
ebla ŝia la rifuzo,
ĵaluzo;
amneanta ŝia vorto,
morto!
Al mi estu bona sorto!
Ami min ne sin detenu;
ĉar, se male, tuj do venu
timo, la ĵaluz' kaj morto!

Julio Mangada Rosenörn.



Bela pejzaço de Asturias

LA KAZOJ KAJ LA PROPOZICIOJ

DE

EDUARDO BENOT

Ne estas ebla la studo pri lingvoj sen iu kono pri la deklinacio kaj pri la strukturo de la propozicioj, pri la lokigo de la vortoj, pri inversigo de ilia ĝenerala ordo, k. c.

Ciceron diris, ke, kvankam la okuloj estas tiuj kiuj ĉion vidas, ili ne vidas, tamen, sin mem. Kaj, certe, al ili ne estas eble sin vidi bone per nerektaj peroj. Kiam ili rigardas sin per spegulo, ili juĝas maldekstren esti tio, kio estas reale dekstre, kaj supozas dekstren tio situata maldekstre. Grandan lernadon bezonas la lingvoj por scii tutcerte ne erarante alproksimiĝi aŭ malalproksimiĝi al la okuloj laŭ la indikoj de siaj bildoj sur la spegulo.

Same okazas al la lingvo. Kvankam la lingvaĵo estas la mirinda ilo por elserĉadi ĉiajn misterojn de la homa penso, la lingvoj, tamen, ne anatomiigas sin mem, sed nur per tre nerektaj analizantaj rimedoj, kiuj, malsaĝe, fraksiigas tion kio estas reale nedividebla. La gramatikisto same, kiel la anatomiisto, studas la apartigitajn membrojn, sed ĉe la dispartigo ne estas la vivo.

Multaj miras, ĉar, PAROLANTE ĈIUJ, la studo pri parolmaniero, bezonas, ke oni metodigu ĝin sur libroj kiuj, kvankam ne malfacilaj, estas certe iomete ne facilaj. Kaj, tamen, neniu miras, ĉar, kvankam ĉiuj, ni, estas kapablaj nin movi, estu necese al la inĝenieroj studi la *meĥanikon pri niaj muskolaj fortoj* sur libroj malfacile kompreneblaj. La reflektata scienco staras tre malproksime de la spontanea kapablo; kaj la Homaro estus mal multe inda se ĝi nur obeus siajn nereflektajn impulsojn.

Nenio similas la spontanee facilmovecon de la kuranta damcervo; sed ĝia rapideco estas multe pli malsupera, ol tiu de la kuglo trafanta la beston. La ĉamo spontanee saltas tertranĉaĵojn, kiuj kapturnigas la homon; sed la larĝeco de tiuj profundaj kavaĵoj estas sensignifaj koncerne la longecon de ponto kurbiĝanta super la abismon.

«¡Paroli! ¡La tuta mondo parolas!...»

Ĉi tion oni diras tre rapide, ĉar tio ne estas vera. La aĵoj ne estas egalaj kaŭze de tio, kio estas komuna al ili: aglo kaj tes-

DE «LOS CASOS Y LAS ORACIONES»

DE

EDUARDO BENOT

No es posible el estudio de las lenguas sin algún conocimiento de la declinación y de la estructura de las cláusulas, colocación de las palabras, inversión de su orden usual, etc.

Decía Cicerón que, con ser los ojos los que todo lo ven, no se ven, sin embargo, a sí mismos. Y, en verdad, que ni aun les es dado verse bien por medios indirectos. Cuando se miran en los espejos, juzgan a la izquierda lo que se encuentra realmente a la derecha, y suponen a la derecha lo situado a la izquierda. Gran aprendizaje necesitan los dedos, si han de saber con seguridad y sin error acercarse a los ojos o alejarse de ellos siguiendo las indicaciones de su imagen.

Así las lenguas. Con ser el lenguaje el maravilloso medio de investigar todos los misterios del pensamiento humano, no se anatomizan, sin embargo, a sí mismas, sino por medios muy indirectos de análisis que, torpemente, fraccionan lo indivisible en la realidad. El gramático, como el anatómico, estudia los miembros separadamente; pero en la separación no está la vida.

A muchos sorprende que, HABLANDO TODOS, necesite el estudio del hablar metodizarse en libros, si no difíciles, de no ligero estudio, ciertamente. Y, sin embargo, a nadie admira que, teniendo todos la facultad de movernos, sea necesario a los ingenieros estudiar la *mecánica de nuestras fuerzas musculares* en libros de la dificultad más abstrusa. La ciencia refleja dista mucho de la facultad espontánea, y bien poco sería la Humanidad abandonada a sus impulsos no reflejos.

Nada iguala a la soltura espontánea de la carrera del gamo; pero su velocidad es muy inferior a la de la bala, que alcanza al animal. La gamuza salva espontáneamente simas que causan vértigos; pero la anchura de esos precipicios es insignificante comparada con la del puente que se encorva sobre el abismo.

«¡Hablar! ¡Todo el mundo habla!...»

Esto se dice así muy pronto, porque no es verdad. Las cosas no son iguales por lo que tienen de común: un águila y una

tudo estus identaj, se sufiĉus por tia sola komuna kapablo: tiu de la movado, ekzemple.

La animaloj parolas, se oni konscias, ke paroli estas eksterigi ion internan. La hundo elesprimas per nedubeblaj signoj, ke ĝi konas sian mastron, ke ĝi festas siajn konatojn, ke ĝi suspektas pri la fremduloj al sia domo kaj ĝi minacas siajn malamikojn; sed neniuj rajtas konkludi identecon inter la hundo kaj la homo, tial ke ĉi tiu konas, festas, suspektas kaj minacas same, kiel la hundo.

¡Paroli! ¡Malmultaj parolas!

Estas malgranda la nombro da personoj kiuj scias paroli, konsciante la parolkapablon ne konfuza elesprimo de la simplaj bezonoj de infano kaj de lia malsaĝa vartistino, jes la ordigita eldirado de la profundaj pensoj enradikiĝintaj en la mirindaj formoj de la oratorarto, de la scienco kaj de la poezio. Demostenes kaj Mirabeau parolis, kiam maturaĝaj, alian lingvon tre malsaman je tiu, kiun ili balbutis dum la infaneco. La vortaro de infano konsistas el kvarcent-kvincent vortoj proksimume; tiu de la grandaj oratoroj supermezuras dek mil vortojn. La elesprimantaj formoj de infano estas tute elementaj ĉu ne mirigas la kuraĝa kaj komplika arkitekturo de la poeziaj formoj? La plej famaj verkistoj atingas utiligi senerare tiel la vortojn kiel iliajn plej labirintajn formojn, dank'al studo kaj ne pro simpla spontaneeco de siaj kapabloj oratoraj. La energioj de la elpensado atingis nesupereblan limon per la verkoj de la Genioj de Hispanujo kaj de Anglujo, Cervantes kaj Shakespeare, kaj, tamen, malkorektaĵoj pri elesprimado—kaj tre gravaj!—, eĉ pri Gramatiko, malbeligas tiujn verkojn, kiuj naskiĝis por la senmorteco.

Okazas, ke la Genio ne povas diveni ĉion, kion la pacien-cema kaj nelacigebla kritiko trafas malkaŝi. La vido de la aglo ne atingas malkaŝi tion, kion facile atingas la mikroskopo kaj la teleskopo, nek la forto de la plej potenca atleto povas premi metalan lameton same kiel nekontraŭstareble faras la ŝtala ŝraŭbo, kiu malrapide turniĝas laŭ impulsoj de lerta manipulanto.

Oni skribas malbone ĉar oni ne scias. Kaj oni ne scias, ĉar malsaĝa priokupiĝo susuras al la oreloj de la malaboremo:

tortuga serían idénticas, si bastase para serlo una cualidad común: la de la locomoción, por ejemplo.

Los animales hablan, si por hablar se entiende exteriorizar algo interior. El perro exterioriza con signos indudables que conoce a su amo, que festeja a sus conocidos, que se recela de los extraños de la casa y amenaza a sus enemigos; pero ¿es lícito a nadie inferir identidad entre el perro y el hombre, fundándose en que el hombre conoce, festeja, recela y amenaza como el perro?

¡Hablar! ¡Cuán pocos hablan!

Es contadísimos el número de los que saben hablar, entendiendo por hablar, no la confusa exteriorización de las simples necesidades del niño y de su ruda nodriza, sino la ordenada manifestación de los profundos pensamientos encarnados en las formas admirables de la oratoria, la ciencia y la poesía. Demóstenes y Mirabeau hablaron, cuando hombres, otra lengua muy distinta de la que balbucieron de párvulos. El vocabulario de un niño es de cuatrocientas a quinientas palabras; el de los grandes oradores pasa de diez mil. Las construcciones elocutivas de que dispone un párvulo son rudimentarias, y ¿no admira la atrevida y complicada arquitectura de las construcciones poéticas? Si los más fecundos escritores logran utilizar sin defectos, tanto los vocablos como sus más intrincadas construcciones, al estudio lo deben y no a la mera espontaneidad de sus facultades oratorias. Las energías de la invención han llegado a su límite infranqueable en las obras de los Genios de España y de Inglaterra, Cervantes y Shakespeare, y, sin embargo, defectos ¡y muy graves! de elocución y aun de gramática afean esas obras, nacidas para la inmortalidad.

Y es que al genio no es dado adivinar todo lo que la paciente e incansable crítica logra descubrir. La vista del águila no alcanza donde llegan fácilmente el microscopio y el telescopio, ni las fuerzas del más enérgico atleta pueden comprimir una lámina metálica con la presión incontrastable del acerado tornillo, que, lentamente, gira a impulsos de hábil manipulador.

Se escribe mal, porque se ignora. Y se ignora, porque una preocupación imbécil susurra en los oídos de la pereza: «¿Qué

«Kion vi atingos studente la regulojn de la parolarto? Vi parolas jam. Nu; por kio pli?»

Kaj, kvankam ĉiuj kantas (ĝenerale tre malbone), neniu estas diranta: «Kion vi atingos studente la regulojn de la notkanto? Vi kantas, tio estas, vi ne detruas la delikatajn aŭdilojn, nu; kial pli?»

Studi la regulojn de la la parolarto estas, *kiam oni faras ĝin bone*, io pli, ol lerni Gramatikon: tio eĉ estas sekci la homan penson; ne ĉar la parolarto estas la penso mem, sed ĉar la intelektaj bezonoj reflektiĝas per ĝiaj esprimiloj, kiuj estas la vortoj kaj ĉi ties formitaĵoj.

Sen materialoj, tio estas, sen ŝtonoj, sen brikoj, sen feraĵoj, sen lignaĵoj, k. c., ne estas domoj kaj konstruaĵoj iaj; sed tiuj materialoj ne estas domoj, ne estas konstruaĵoj. Post tertremo, renversinta ilin, restas ĉiuj tiuj materialoj, sed ili ne povos esti plu loĝejo de iu persono. Sen sonoroj, ne estas muziko, sed la manbatado de infano sur la klavaron de piano ne estas muziko. La muziko staras ĉe la ORDO en la sinsekvado de la sonoroj. La konstruaĵoj de la arkitekturo dependas de la ORDO por la almetado de la materialoj.

Analoge, oni devas proklami, ke sen paroloj oni ne parolas; sed en la paroloj ne kuŝas la ESENCO DE LA PAROLARTO. Oni parolas ORDIGANTE la parolojn; tio estas, rilatigante parolojn kun aliaj; modifante kaj determinante ilin laŭ la specialaj normoj de la parolarto. Tiel la arto por la decimalla skribado de la nombroj ne konsistas ekskluzive el la naŭ unuaj gradoj de la skalo de la plureco reprezentataj de naŭ ciferoj, sed de la saĝa organizado de la sistemo donanta al ĉiu cifero kreskantajn aŭ malkreskantajn valorojn, laŭ geometriaj kondiĉoj, per lokigo de la ciferoj dekstren aŭ maldekstren de deirloko.

La parolarto ne kuŝas, do, en la paroloj, sed en la METODA ORGANIZADO de sistemo tre komplika pro ĝia malperfekteco aŭ ne sufiĉeco, per kiu oni formas la proprajn nomojn por la objektoj, faroj kaj statoj pri kiuj oni devas diri ion.

Studi tiel la Gramatikon estas studi la PENSON.

Por enradikigi, do, la bazojn de tiu speciala sistema ORGANIZADO de la lingvoj de nia familio, mi verkis ĉi tiujn MAL-

vas a conseguir con estudiar las reglas del lenguaje? ¿No hablas ya? Pues ¿a qué más?»

Y, sin embargo, de que todo el mundo canta (generalmente muy mal), no hay nadie que diga: «¿Qué vas a conseguir con estudiar las reglas del solfeo?» «¿No cantas ya?» «Es decir ¿no destrozas los oídos delicados?» «Pues ¿a qué más?»

Estudiar las reglas del lenguaje es, *cuando se hace bien*, algo más que aprender Gramática: es nada menos que disecar el pensamiento humano, no porque el lenguaje sea el pensamiento mismo, sino porque las necesidades intelectuales se reflejan en sus instrumentos de expresión, que son las palabras y sus construcciones.

Sin materiales, esto es, sin piedras ni ladrillos, sin hierros ni maderas, etc., no hay casas ni edificios de ninguna clase; pero esos materiales no son casas ni constituyen edificios. Después de un terremoto que los haya derribado, todos esos materiales existirán todavía, pero sin poder ser ya residencia de persona alguna. Sin sonidos no hay música, pero las manotadas de un párvulo sobre las teclas de un piano no son música. La música está en el ORDEN de sucesión de los sonidos. Las construcciones de la Arquitectura dependen del ORDEN de colocación de los materiales.

Análogamente debe proclamarse que sin palabras no se habla; pero que en las palabras no reside la ESENCIA DEL HABLAR. Se habla ORDENANDO los vocablos; esto es, relacionando unas palabras con otras; modificándolas y determinándolas con arreglo a las normas especiales del hablar. Así, el arte de la numeración decimal escrita no consiste exclusivamente en que nueve cifras representan los nueve primeros grados de la escala de la pluralidad, sino en la sabia organización del sistema que da a cada guarismo valores crecientes o decrecientes en razón geométrica, su colocación hacia la derecha o hacia la izquierda, desde un punto inicial.

El arte de hablar no está, pues, en las palabras, sino en la ORGANIZACION METODICA de un sistema muy complicado, por lo imperfecto o deficiente, en cuya virtud formamos los nombres propios de los objetos y de los actos o estados acerca de los cuales tenemos algo que decir.

LONGAJN NOTOJN, kies utilecon ĉiutage mi vidas pli evidenta, kaj kies bezonon konscios ĉiuj sin demandantaj: «Ĉu estas multaj tiuj, kiuj scias skribi?»

Mi povas certigi, kaŭze de longega praktiko (longedaŭra pli, ol tridek kvin jaroj!), ke la persono, kiuj profunde konatiĝis kun la elementaj klarigoj entenataj de ĉi tiuj MALLONGAJ NOTOJ, ne trovas malfacilaĵon por lerni lingvojn; kaj ke mia granda malfacilaĵo por komprenigi ilin, ĉiam estis venki malpravan kontraŭstarecon de la lernantoj, SPECIALE DE LA PLENKRESKULOJ, por dediĉi iom da tempo al studo de la doktrino skizita de tiu ĉi verketo.

Kion oni bezonas, do, por lerni la arkitekturon de la lingvo?

Ha! mi bone konas tion; oni bezonas malfacilegan kondiĉon:

Venki la tedon de la memvolo.

* * *

Kvazaŭ averton, sciŭ: ĉi tiu verketo nur estas INICIATILLO.

LIBRO UNUA

ESPRIMESENCOJ KUN SENCO KOMPLETA

KAJ SENDEPENDA

Sen paroloj oni ne parolas; sed ĉe la paroloj ne kuŝas la ESENCO de la parolarto.

Oni parolas RILATIGANTE la parolojn sisteme, por arigi ilin PROPOZICIOJ esprimantaj tion, kio okazas ĉe nia mio.

Antaŭ ĉio, estas, do, necese konstati tiujn RILATOJN, kiuj ligas, ĉe ĉiu propozicio, la parolojn inter_{si} mem.

Estudiar con este sentido la Gramática es estudiar el PEN-SAMIENTO.

Para inculcar, pues, las bases de esa especial ORGANIZACION sistemática de las lenguas de nuestra familia fueron escritos estos BREVES APUNTES, cuya utilidad se me hace más patente cada día, y cuya necesidad comprenderán cuantos se hagan esta pregunta: ¿Son muchos los que saben escribir?

Yo puedo asegurar, fundado en una práctica larguísima (¡de más de treinta y cinco años!), que no encuentran obstáculo en la adquisición de las lenguas las personas familiarizadas con las nociones contenidas en estos BREVES APUNTES; y que mi gran dificultad en hacerlos comprender, ha sido siempre la de vencer en los alumnos, ESPECIALMENTE EN LOS ADULTOS, su injustificada hostilidad a consagrar algún tiempo al estudio de la doctrina en este opúsculo esbozado.

¿Qué se necesita, pues, para aprender la arquitectura del lenguaje?

¡Ah!, yo bien lo conozco; una condición difícilísima: Vencer las repugnancias de la voluntad.

* * *

Como advertencia sépase que este opúsculo es solamente una INICIACION.

LIBRO PRIMERO

ENTIDADES ELOCUTIVAS CON SENTIDO COMPLETO E INDEPENDIENTE

Sin palabras no se habla; pero en las palabras no reside la ESENCIA de hablar.

Se habla RELACIONANDO los vocablos sistemáticamente, para constituirlos en CLAUSULAS expresivas de lo que pasa en nuestro yo.

Ante todo hay, pues, que reconocer esas RELACIONES que ligan en cada cláusula las palabras entre sí.

LECIONO I^a

PRI LA NOMINATIVO

Tiu kiu saltas; tiu kiu kuras; tiu kiu estas; tiu kiu manĝas; tiu kiu skribas; tiu kiu legas; unuvorte kiu faras ion, tiu estas NOMINATIVO.

JOHANO KURAS. Kiu estas *tiu, kiu* kuras? Johano. Do, *Johano* estas nominativo.

* LA KAPITANO PIEDIRAS. Kiu estas *tiu, kiu* piediras? La kapitano. Do, *la kapitano* estas nominativo.

Nu; estas NOMINATIVO la parolo per kiu oni respondas la demandon: kiu estas *tiu kiu..?* (aŭ kiu estas *kiu...?*)

Diru kiuĵ vortoj estas, kaj kial ili estas, nominativoj en la jena temo:

Temo I^a

La masonisto *saltas*. La hundoj *kuras*. La knabo *faletas*. La lupoj *blekas*. La turtoj *kveras*. La infano *ĝemas*. La generalo *skribas*. La soldatoj *batalas*. La birdo *flugas*. La hundoj *vojas*. Ĉi tiu leono *blekegas*.

Demandu: kiu estas *tiu, kiu* saltas? La masonisto. Nu; kiu estas la nominativo? La masonisto. Faru analogajn demandojn por la ceteraj ekzemploj de la temo.

(Daŭrigota)

LECCION PRIMERA

DEL NOMINATIVO

El que salta; el que corre; el que está; el que come; el que escribe; el que lee; en una palabra, quien hace algo, está en NOMINATIVO.

JUAN CORRE. ¿Quién es *el que corre*? Juan. Luego *Juan* es el nominativo.

EL CAPITÁN ANDA. ¿Quién es *quien anda*? El capitán. Luego *el capitán* es el nominativo.

Está pues en NOMINATIVO la palabra con que se responde a la pregunta ¿quién es *el que...*? (o ¿quién es *quien...*?)


Dígase cuáles palabras, y por qué, están en nominativo en el tema siguiente.

Tema primero

El albañil *salta*. Los perros *corren*. El muchacho *tropleza*. Los lobos *aúllan*. La tórtola *arrulla*. El niño *gime*. El general *escribe*. Los soldados *pelean*. El pájaro *vuela*. Los perros *ladran*. Este león *ruge*.

Pregúntese: ¿Quién es *quien salta*? El albañil. Luego ¿cuál es el nominativo? *El albañil*. Háganse preguntas análogas a la anterior en los demás ejemplos del tema.

(Continuará)



Porda del alajo.—Katedralo de Oviedo

DEL EXTRANJERO

Dejando a un lado cuanto se relaciona con la mayor o menor actividad de los núcleos esperantistas, diseminados por todo el mundo, he aquí lo verdaderamente interesante y demostrativo del interés que despierta el Esperanto y de cómo se abre camino.

LAS GRANDES ORGANIZACIONES INTERNACIONALES Y EL ESPERANTO

Los Congresos internacionales tropiezan, cada día más, con la dificultad de las lenguas. No es, pues, de extrañar que los círculos internacionales se interesen siempre más por el Esperanto. Se ve en él un medio de evitar un obstáculo insuperable.

El Congreso de la Federación Mundial de las Sociedades de Educación, que ha tenido lugar en Toronto (Canadá), en el último mes de agosto, ha adoptado unánimemente una resolución, tocante al uso de la lengua auxiliar en los Congresos y ha encargado a una Comisión examinar a fondo este problema.

El Comité de la Unión de Obreros de la Vía, en Bulgaria, publica en su órgano oficial (número de diciembre de 1927) la decisión siguiente:

La Unión decide:

a) Introducir en su órgano una sección para el Esperanto, a fin de interesar a sus miembros en el estudio de esta lengua auxiliar y también para informar a sus compañeros del Extranjero acerca de los principales resultados de su actividad.

b) Usar lo más pronto posible el Esperanto como única lengua para la correspondencia internacional con la Oficina de la Unión.

La sección húngara de la Asociación de Turismo «Los Amigos de la Naturaleza» ha decidido lo siguiente en su reunión anual de Budapest (febrero de 1928):

1) Recomendar en el próximo Congreso internacional de los «Amigos de la Naturaleza» el estudio del Esperanto a todos los miembros.

2) Abrir cursos de Esperanto en todos los grupos y secciones.

3) Usar el Esperanto para organizar las relaciones con los grupos extranjeros.

4) Introducir regularmente una sección para el Esperanto en su órgano oficial.

El número de Conferencias y de Congresos internacionales que admiten el Esperanto o se sirven de él como única lengua de traducción aumenta cada día más.

Siguiendo la invitación de la Oficina de la Feria de Francfort del Main, una Conferencia Internacional del Turismo y de la Publicidad tendrá lugar en Francfort (Pascua, 1929). Se cuenta con la participación de un número bastante elevado de personas y de organizaciones del mundo entero que se interesan en este asunto. Los discursos y las informaciones serán admitidos en todas las lenguas nacionales, pero el Esperanto será la única lengua de traducción durante la Conferencia.

El próximo Congreso de la Federación de Asociaciones de Educación tendrá lugar en Ginebra, a principios del mes de agosto de 1929, bajo los auspicios de la Oficina Internacional de Educación.

El Esperanto será la única lengua de traducción admitida en ciertas secciones.

EL ESPERANTO EN LA ESCUELA

En Austria.—El Consejo Administrativo de Viena ha decidido, en una de sus últimas sesiones, la organización de 24 nuevos cursos de Esperanto en las escuelas elementales de la capital austríaca. La enseñanza facultativa de la lengua auxiliar ha sido introducida en el programa de la Escuela Normal de Maestros en Ströbersdorf.

En Finlandia.—Acaba de introducirse el Esperanto en tres clases del Liceo Normal finlandés, en Helsingfors, donde los alumnos-maestros de la Escuela Normal deben hacer sus primeras lecciones de ensayo. El estudio es obligatorio para los participantes en los cursos.

En Francia.—La Escuela Municipal para el Comercio Exterior y la representación en París, en la que se enseña el Esperanto como asignatura obligatoria, acaba de organizar por primer vez exámenes para los que quieran obtener el diploma oficial de estudios en Esperanto.

En Italia.—El Instituto fascista de la Enseñanza, en Brescia, ha introducido el Esperanto en su programa. Se espera que este ejemplo será seguido por otras ciudades.

En los Países Bajos.—El Instituto Comercial Schoevers, en La Haya, ha introducido el estudio del Esperanto y acaba de organizar varios cursos de esta lengua.

La enseñanza del Esperanto ha sido introducida en un número bastante elevado de escuelas de varios países, a título facultativo u obligatorio.

Por decreto II P. 5.211/28.18.8.28, el Ministerio de Cultos y de Instrucción Pública de la República polaca ha autorizado la enseñanza facultativa del Esperanto en todas las escuelas en que se manifieste tal deseo.

En Austria y en Checoslovaquia los exámenes oficiales de Esperanto continúan regularmente llamando cada vez más la atención y despertando el interés en los centros pedagógicos. Una guía semi-oficial, publicada últimamente para los oficiales de la República checoslovaca, en Presburg (Bratislava), contiene igualmente un estatuto de exámenes de Esperanto, asignatura facultativa en varias escuelas.

En Grecia.—Por decreto del 28 de octubre de 1926 (número 57.363), el Ministerio de Cultos y de Instrucción pública de la República helénica, ha autorizado ya la enseñanza del Esperanto en las Escuelas Normales del Magisterio primario. Por decreto especial núm. 36.816 del 14 de octubre de 1927, el nuevo ministro de Instrucción pública, Excmo. Sr. Nicoloudis, ha prorrogado dicha autorización.

El Turismo y el Esperanto.—Con motivo del XXI.º Congreso Universal del Esperanto que se verificará en Budapest, del 2 al 9 de agosto de 1929, la Oficina del Turismo, de Budapest, ha publicado un prospecto en Esperanto y también un «desplegante», ricamente ilustrado, cuyo título es: «Budapest, la Reina del Danubio».

Además ha distribuido un cartel muy artístico, en vista de este Congreso, que, como los anteriores, atraerá, sin duda, participantes del mundo entero.

Las Oficinas de Turismo de Stettin, Dresden, Dordrecht (Países Bajos) han publicado prospectos en Esperanto. El Ministerio austríaco del Comercio y del Turismo acaba de publicar un

prospecto, que se despliega, enteramente en Esperanto. En gran cantidad ha sido distribuido por todas partes.

Para dar a conocer las fiestas conmemorativas del 4.º centenario del ilustre pintor Albrecht Dürer, el Sindicato Municipal de Iniciativas de Nürnberg se sirve del Esperanto.

La T. S. H. y el Esperanto.—El Esperanto continúa figurando en los programas de las estaciones de T. S. H. por todas partes en mayor o menor escala.

Conferencias en Esperanto han sido transmitidas por las estaciones de Falun (Suecia) 24.10., 8.12., Leipzig-Dresden 29.10.; Praga 15.11., 3.12., 15.12., Kowno 15.12., Eskilstuna 4.11., Gävle 16.11., Sundsvall 26.11., Berlín-Stettin, 16.2., Langenberg, 15.12.

Nuevos cursos han empezado en las estaciones de Lyon (8.11.) y de Königsberg (27.11.)


Las estaciones japonesas JQCK (Dairen) y JOCK (Nagoja) transmitieron programas especiales el día de la fiesta de Zamenhof, autor del Esperanto. Con ocasión de las transmisiones de Esperanto por la estación JOCK (Tokío), en el mes de diciembre de 1927, se vendieron 15.000 manuales de Esperanto.

Actualmente figuran transmisiones regulares de Esperanto en los programas de las estaciones siguientes:

En Alemania: Königsberg, Amburgo, Stuttgart, Breslau, Zeesen; en Austria: Viena; en Checoslovaquia: Brno-Brünn; en España: Bilbao; en Estonia: Tallin (Reval); en Francia: París; en Lituania: Kaunas (Kovno); en Rusia: Minsko, Koscova; en Siberia: Novosibirsk; en Suiza: Berna, Ginebra, Zürich; en Ucrania: Chaekov, Odessa; en Yugoslavia: Zagreb.

El redactor de la importante revista radiofónica *World Radio*, desde enero abrió en esta revista una sección esperantista; publica un curso y anuncia las radiaciones esperantistas, publicando textos sobre ellas. Esto supone un gran éxito, porque *World Radio* es uno de los órganos oficiales de la Sociedad británica de radioescuchas que, en número considerable, lo leen, así como muchos que no pertenecen a dicha organización, realizando cerca de éstos una eficaz instigación al aprendizaje del Esperanto. Semanal o quincenalmente aparece esta interesante sección.

Cuantos radien en Esperanto deben informar al S-ro W. H. Matthews (142, High Holborn. LONDON W. C. 1.)



Baziliko de Covadonga.—Asturias

HISPANA ESPERANTO-ASOCIO gravege progresas kaj plenumas la rolon por la disvastigo de Esperanto en la tuta lando; tial estas devo de Esperantisto aliĝi al ĝi kaj varbi por ĝi novajn adeptojn. La kotizo estas DU pesetoj (unua kotizo 2,50 pro la membrokartoj). Sendu la kotizon al la sekretario, S-ro Mariano Mojado, strato Abascal, 13, Madrid. Se vi sendus samtempe TRI pliajn pesetojn por subteni la propagandon per ĉi tiu gazeto vi ricevos akurate kaj ĉiumonate ĝin. LA NOVAJ HELPANTOJ ankaŭ ricevos senpage la novelon «Ferdinando VI^a kaj Farinelli», kaj la unuan kajeron de l'Kihoto; kaj certe ĉiuj konscios ke H. E. A. celas ĉiel kontentigi kiel eble plej bone kaj tute malavare la samideanojn.

Eksterlandanoj, sendintaj KVIN sv. fr., ricevos la gazeton, sen donacoj, ĉar la poŝtelspezo estas tre alta; tamen, se oni sendus SES sv. fr., sendinto ricevus la kolekton 1928. Oni akceptas RESPONDKUPONOJN de U. E. A.

Ĉiu sendu la monon poŝtgire al S-ro Mojado kaj enlandanoj. povas pagi per poŝtmarkoj en rekomendita letero.

INTERŜANĜO nur po du specimenoj.

Gazeton, presaĵojn, materialon, k. c., sendu al la Redakcio.